

HORIZONTO

V-a JARO N-o 30 (6)
NOVEMBRO - DECEMBRO 1980

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



LA MARVIRINETO

PENSOJ DE ZAMENHOF

KIAM FLORAS LA TIMIANOJ

REMEMOROJ

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón

Redakta Komitato
Salvador Gumà
Juan Régulo
Jean Thierry

Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º de la Constitución, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76

N.º 6 - Novembro - Decembro 1980

ENHAVO

PENSOJ DE ZAMENHOF — EN LA 121ª
DATREVENO DE LIA NASKIĜO
REMEMOROJ (Inés Gastón)

Esperanto, Natura Lingvo (Delfi Dalmau)
Barcelono 1909 (Edmond Privat)

STATUTO DE INTERNACIA CENTRO de
la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
OFICIALA KOMUNIKO DE LA
AKADEMIO DE ESPERANTO

VI-a INTERNACIA KONFERENCO DE
LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
(Lis Thune)

BELETRO

Kiam floras la Timianoj (Salvador Gumà)
EL LA SEKRETARIA MEMUARO DE LA
19-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ
(G. Mora i Arana)

LA ALĤEMIISTO (trad. Liven Dek)

LA FENDISTO DE SANKTULOJ
(Salvador Gumà)

CERVANTES, AMERIKO KAJ LA VERKO
«DON QUIJOTE» (trad. Inés Gastón)

ORTOGRAFIA ĤAOSO/KAOSO EN
ESPERANTO (Bernard Golden)

LIBROJ SUB LA LUPEO
(Recenzas Salvador Gumà)

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ - 1981

INTERNACIA CENTRO DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
(ICNEM)

7-a INTERNACIA KONFERENCO
DE N.E.M. - Oficiala Informilo N.º 2

POR 1981-jaro

Jara abonpago por ĉiuj landoj: 100 danaj
kronoj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845.

Britujo:

Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON
N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106.

Danlando:

Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610
RØDOVRE, Pĉk. 6287859.

Finlando:

Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
KUOPIO 10, Pĉk. KU 152801-5.

Francujo:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V.

FR Germanujo:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
MÖHNESEE-GÜNNE. Konto-Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85).

Grekujo:

Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omo-
nia, ATHENO 101.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH
TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4-45854-8.

Jugoslavio:

D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10,
YU-41000 ZAGREB.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO
Ont. M4S 2V2.

Luksemburgo:

Wickler Albert, OLM. Pĉk. 54175-49.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)



PENSOJ DE ZAMENHOF - EN LA 121^a DATREVENO DE LIA NASKIĜO

15 - 12 - 1980

«Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia.» (*Moto sur la 1-a paĝo de la Unua Libro.*)

«La Internacia Lingvo, same kiel ĉiu nacia, estas socia propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi.» (*Dua paĝo de la Unua Libro.*)

«Sed mia lingvo havas ankoraŭ alian celon: nekontentiĝante je *internacieco*, ĝi devas ankoraŭ fariĝi *tutmonda*, t.e. atingi tion, ke la plejparto de la mondo scianta legi kaj skribi povu libere paroli ĝin.» (*El antaŭparolo al la Unua Libro.*)

«Por mi persone estus kompreneble multe pli oportuna teni la sorton de l' lingvo internacia en miaj manoj. Tial, mi esperas, la leganto komprenos, ke kreinte la fundamenton de l' lingvo mi nun deponas de mi tutan aŭtoritaton nur tial, ke mi profunde kredas, ke tion postulas la interesoj de l' afero. La tempo, mi esperas, montros, ke mi ne eraris.» (*El Antaŭparolo al la Dua Libro, Originala Verkaro, p. 36.*)

«Via granda batalado kontraŭ la diversaj projektoj de novaj lingvoj ŝajnas al mi tute superflua, ĉar laŭ mia opinio vi batalas kontraŭ fantomoj. Ili dissendas leterojn al diversaj personoj kiuj *komprenas la plej gravajn eŭropajn lingvojn* kaj poste ili trumpetas al la mondo, ke tiuj personoj tuj komprenis iliajn leterojn pli ol leterojn en Esperanto. Sed tio ĉi estas ja nur trompa iluzio, kiun multaj personoj bedaŭrinde ne rimarkas, sed kiu tuj aperos, kiam oni volos *lerni* ilian «lingvon». *Poliglota* personoj facile komprenos ilin ankaŭ se ili skribos *angle, france, aŭ latine*; sed ĉu kolektaj da vortoj kompreneblaj por poliglotoj estas *lingvo* kaj povus servi al la *tuta mondo*?... Ĉu ni kontraŭ ĉiu el ili batalos? Ĉu ni ĉiam denove ripetados la malnovan kanton? La sola batalilo kontraŭ tiuj ĉi malamikoj estas absoluta silentado.» (*Originala Verkaro, pp. 559, 560 kaj 168.*)

REMEMOROJ

Kiam mi alvenas al la fino de mia laboro por Esperanto, kiel gvidanto de revuo post 17 jaroj de konstanta aktivado en tiu ĉi kampo, unue en BOLETIN, organo de la Hispana Esperanto-Federacio, kaj de la jaro 1976-a en «Horizonto», venas al mia memoro la plej gravaj agadoj, kiujn ni devis entrepreni post la hispana milito, en nia longa vivo esperantista. — Kun tiuj rememoroj, venas al mi du nomoj: Delfi Dalmau, kaj Edmond Privat, kun kiuj mi interrilatis, ĉu por konsulti, ĉu por informi pri niaj decidoj, rilate nian por Esperanto laboron, en la nacia kaj internacia medioj. — Kial estis mi, kiu interrilatis kun ili? Tutsimple, ĉar kiam post la hispana milito, en 1957-a, mi aliĝis al UEA, S-ro Dalmau, kaj en 1959-a kiam mi fariĝis FD. de UEA, S-ro Privat, ambaŭ havis saman reason, pli-malpli per samaj vortoj: «Mi ĝojas ke denove, en la vicjoj de UEA, aperas la nomo Gastón». Verdire, la kontakto kun S-ro Dalmau restis ne rompita ekde nia juneco. Lastan kontakton kun S-ro Privat, ni havis okaze de la petskribo por la Nobel Premio pri Paco al U.E.A., en la jaro 1961-a, bazita sur la paca agado, «Helpe al Aŭstriaĵ Infanoj», fare de la Prezidanto de la Provinca Deputitaro de Zaragoza kaj de mia frato Rafael Gastón, kiel posteuloj de la tiama Patronaro, por tiu paca agado.

Por kompensi la legantojn de miaj vortoj, mi aperigas artikoletojn de S-roj Privat kaj Dalmau, el «Aventuroj de Pioniro», La Laguna 1962, kaj «Dialekto Dialektiko», Barcelona 1956, respektive.

Inés Gastón

ESPERANTO, NATURA LINGVO

Ju pli daŭras Esperanto, des pli ĝi naturiĝas eĉ en nia teoriado. Antaŭ jardekoj, ni ĝenerale konsentis ke nia lingvo estas artefarita. Poste, iom post iom, ni trovis ĝin pli kaj pli natura: tial ke ĝiaj elementoj estas eltiritaj el naturaj lingvoj, tial ke ĝi evoluas idente kiel naciaj lingvoj, tial ke ĝi estas trovata logika, facila, familiara, intima.

Sed estas fakto, kiun mi ne vidis ĝis nun elstarigita, kiu eble tion meritas.

Mi vere intime konas nian movadon nur en Katalunujo. Tamen, eblis al mi konstati ke estas samideanoj kiuj pli *nature*, pli *facile*, pli *korekte*, pli *elokvente* parolas, paroladas aŭ verkas en Esperanto ol en sia hejma, gepatra lingvo: Gumà, Alberich, Masachs, Solà, Hernández. Poetoj kiel Artur Doménech kaj Grau-Cases estas tute nekonataj pro verkaĵoj en nacia lingvo. Ĉu ne same okazas en aliaj landoj? Ĉu, ekzemple, Baghy kaj Kalocsay ne pli bone, facile, nature verkis en Esperanto ol en sia gepatra lingvo? Ĉu en Aŭstralio kaj Finnlando, en Francujo kaj Anglujo, en Nederlando, Polujo, Helenujo kaj aliaj landoj ne okazas same, ne fakte ke iuj esperantistoj pli spontanee kaj facile parolas, paroladas aŭ verkadas en Esperanto ol en sia nacia lingvo?

Se tia fakto estus principe konstatebla kiel internacia, eble interese estus profunde enketi kaj ĝin pristudi.

Kion vi observis, kion vi scias tiurilate, pri viaj enlandaj samideanoj?

Delfi Dalmau

BARCELONO 1909

Mian dudekjaran naskiĝtagon mi ĝoje festis en Barcelono, dum la kvina universala kongreso en 1909. Longan tablon mi luis en la ĝardeno de bela kataluna palaco kaj tie sidis, kun la gastoj, D-ro Zamenhof, generalo Sebert, profesoro Cart, profesoro Bourlet, Hector Hodler kaj S-ino de Mènil, kies edzo verkis la muzikon de *La Espero*. Ŝi prezidis la tablon kiel patrino de mia junula festo.

Sed multe pli impona ceremonio okazis alian tagon en la palaco mem. Tio estis la famaj Floraj Ludoj, konataj kiel Literaturaj Konkursoj de la kataluna lingvo, sed tiun ĉi fojon dediĉitaj al esperanta poezio. La reĝino de la ludoj estis nia dresdena poetino Marie Hankel kaj ŝi sidis sur alta trono inter barcelonaj oficiroj kun brilaj uniformoj kaj blankaj plumoj sur la kaskoj.

Premion de poezio mi gajnis kaj estis devigita trairi la grandan amasan aŭdantaron por supreniri la tri ŝtupojn kaj ricevi, sur genuoj, la premion el la manoj de la nobla grizhara reĝino de poezio. Jam tio estis tre timiga malgraŭ ŝia bonvola rideto, sed poste, laŭ la tradicio, mi devis laŭte legi mian poemon *Sur vojo de l' vivo* antaŭ la publiko, kaj tion mi faris tre timeme kaj embarase:

*Sur vojo de l' vivo nun dolĉa kaj bela,
Ni, kvazaŭ du cignoj sur blua rivero
Malpeze glitadis al revo ĉiela,
Dum harpoj kantadis pri l' ama mistero.*

Poste profesoro Cart tre patre konsilis min, ke mi lernu pli bone kaj pli klare legi por alia fojo. Sed tio ne malkuraĝigis min pri verkado de poemoj kaj mi poste presigis en Cambridge esperantan poemaron titolitan *Tra l' silento*, konvinkita, ke nia lingvo havas belan sonon kaj posedas grandan trezoron de harmoniaj eblecoj por artistoj de la vortoj. Kvankam ĝia celo estas ĉefe praktika kaj psikologia por helpi la homojn interkompreniĝi kaj unuigi pri homaraj aferoj, neniu povas malpermesi, ke homoj bon-gustaj ĝin uzu por esprimi sentojn kaj tion faru per elekto kaj aranĝo de vortoj, kiuj kreu impreson de belo.

En niaj kongresoj estos ĉiam kelkaj personoj parolantaj pli clegante; en nia verkaro estos ĉiam aŭtoroj, kies stilo plaĉas. Tio nur pruvas, ke la lingvo vivas kaj fariĝis vere homa esprimo. Multon ŝuldas la lingvo al la fruaj poemoj de Zamenhof mem, al la poezio de Baghy aŭ de Kalocsay. Ili donis flugilojn al la lingvo kaj ebligis nin ami ĝin, ne nur uzi utile.

Edmond Privat

STATUTO de INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Art. 1 Nomo kaj Sidejo

- 1.1 **Nomo:** La nomo de la organizaĵo estas: Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM), en la plua teksto «la Centro»,
- 1.2 **Sidejo:** Pri la sidejo de la Centro decidus la ĉefkunveno, aŭ, se pro kiu ajn kaŭzo ne eblas voĉdonigi ĝin, la Plenuma Komitato.

Art. 2 Deklaro de Principoj

La gvidideoj de la Centro estas entenataj en la Deklaro de Principoj akceptita de la Unua Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado (Saarbrücken, aŭgusto 1975) presita en *Horizonto* n-ro 1/76 kaj represita en ĉap. 7.8 de la verko *Hamburgo en Retrospektivo*, kies unua iom reviziita punkto nun tekstas: «*El ĉiuj projektoj de komuna lingvo nur Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta komunajo. Tiu komunajo havas la moralan devon konservi ekster ĉiu ajn partipolitika ideologio aŭ fremda idearo la neŭtrale homan karakteron de la Zamenhofa Esperanto kaj de la humaneca internaciismo esence ligita al ĝi.*» La Deklaron de Principoj kompletigas la Rezolucio de la Kvina Internacia Konferenco de N.E.M. (Ateno, septembro 1979) laŭ la teksto publikigita en n-ro 3/80 de *HORIZONTO*.

Art. 3 Celoj kaj Rimedoj

- 3.1 **Celoj:** Konforme al la Deklaro de Principoj la celoj de la Centro estas:
 - 3.1.1 Progresigi la disvastigon kaj praktikan uzadon de la Internacia Lingvo (Esperanto), kiel difinita en la Fundamento kaj evoluigita skribe kaj parole de la plej kompetentaj aŭtoroj.
 - 3.1.2 Manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.
 - 3.1.3 Kunordigi la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj kaj agadgrupoj, se ili deziras tion.
 - 3.1.4 Kontribui al respektigo ĉie en la mondo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, eksplicite menciitaj en la Statuto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) jam ekde 1947 kaj observataj ĝis la elekto de la Estraro de UEA en 1974, nun formulitaj en la morale kaj internacijure deviga Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948), precipe la rajtoj entenataj en ĝiaj art. 13 (libera moviĝo) kaj art. 19 (libera komunikado), kiel kondiĉoj por plua efika disvastigado de la Internacia Lingvo, kies ĝeneraligo siavice estas unu el la esencaj kondiĉoj por la plena realigo de ĉiuj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.
 - 3.1.5 Atingi, ke UEA, t.e. ĉiuj aliĝintaj asocioj kaj unuopuloj apartenantaj al ĝi, reenkonduku kaj en la Statuton de la Asocio kaj en siajn agadojn la principon de partipolitika neŭtraleco kiel difinita en la antaŭa Statuto (precipe art. 4 kaj 13) kaj kiel praktikata ĝis la eventoj de Hamburgo en 1974. Per la realigo de tiu celo esence grava por la universaleco de UEA la Centro fariĝos superflua kaj ĝi estos dissolvita konforme al art. 8.1.
- 3.2 **Rimedoj:** La Centro realigos siajn celojn per:
 - 3.2.1 Publikigado de periodaĵo(j) aŭ subteno al periodaĵoj kaj publikaĵoj konformaj al la celoj;
 - 3.2.2 Internaciaj konferencoj kaj alispecaj renkontiĝoj;
 - 3.2.3 Informado kaj dokumentado;

3.2.4 Ĉiuj aliaj jure permesitaj rimedoj.

Art. 4 Financoj

- 4.1 **Enspezoj:** La enspezoj konsistas el kontribuoj kaj kotizoj de la membroj laŭ art. 5, donacoj, heredaĵoj kaj gajnoj.
- 4.2 **Elspezoj:** Pri la elspezoj decidas la Ĉefkunveno en la buĝeto aŭ, en kazo de urĝeco, la Plenumkomitato laŭ la ĝeneralaj direktivoj de la Ĉefkunveno.

Art. 5 Membroj: Ordinara kaj Neordinara

- 5.1 **Ordinara membro:** Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu parolas la Internacian Lingvon, kaj ĉiu Esperanto-organizaĵo, kiu agas konforme al art. 2, en jenaj kategorioj:
- 5.1.1 **Fondinto,** t.e. fizika aŭ jura persono, kiu subskribis la akton pri la fondo de la Centro, subtenis la revuon **Horizonto** per donacoj de minimume 15 000 hispanaj pesetoj ĝis la 1-a de oktobro 1980, konsentis fariĝi fondinto kaj daŭrigi la membrecon minimume en kategorio de aktiva membro.
- 5.1.2 **Bonfaranto,** t.e. persono, kiu kontribuas unu fojon la sumon de minimume 2 000 svisaj frankoj aŭ egalvaloro kaj sin devontigas pagi maksimume 2 000 pliajn svisajn frankojn aŭ egalvaloron por pagi proporcie la ŝuldojn en kazo de likvido de la Centro pro ŝuldoj (Art. 8.2). Bonfaranto ricevas la titolon «Bonfaranto de la Neŭtrala Esperanto-Movado».
- 5.1.3 **Apoganto,** t.e. persono, kiu kontribuas unu fojon la sumon de 1 000 svisaj frankoj aŭ egalvaloro kaj devontigas sin pagi maksimume 1 000 pliajn svisajn frankojn aŭ egalvaloron por pagi proporcie la ŝuldojn en kazo de likvido de la Centro pro ŝuldoj (Art. 8.2).
- 5.1.4 **Aktiva membro,** kies jara kotizo estas 50 svisaj frankoj aŭ egalvaloro.
- 5.2 **Neordinara membro:** Kiel neordinara membro povas esti akceptita fizika aŭ jura persono en jenaj kategorioj:
- 5.2.1 **Mecenato,** kies unufoja kontribuo estas minimume 10 000 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Mecenato ricevas la titolon «Meccnato de la Neŭtrala Esperanto-Movado».
- 5.2.2 **Subvencianto,** kies jara subvencio estas minimume 500 svisaj frankoj aŭ egalvaloro.
- 5.3 **Akcepto, eksigo kaj ekŝigo:** La membrojn akceptas aŭ eksigas la Plenumkomitato. Kontraŭ la decido de la Plenumkomitato estas eble plendi al la Ĉefkunveno, kies decido estas definitiva. Ĝis la decido de la Ĉefkunveno validas tiu de la Plenumkomitato. Membro povas ekŝigi per skriba informo al la Plenumkomitato. Aktiva membro kaj subvencianto, kiu post dufoja skriba admono ne pagis sian kotizon aŭ subvencion estas rigardata kiel ekŝiginta. La pagitaj kotizoj kaj aliaj kontribuoj ne estas redoneblaj.
- 5.4 **Rajtoj:** Ĉiuj membroj havas la rajton ricevadi senpage la periodaĵo(j)n, dokumentojn, cirkulerojn kaj aliajn publikaĵojn de la Centro, ĉeesti ĉiujn kunvenojn, fari proponojn kaj partopreni en diskutoj aŭ persone aŭ pere de reprezentanto, sed nur la ordinara membroj havas voĉdonan rajton.
- 5.5 **Devoj:** La membroj devas observi la Statuton kaj klopodi realigi la celojn de la Centro. Ili pagas la kontribuojn aŭ kotizojn fiksitajn en la Statuto aŭ modifitajn de la Ĉefkunveno proporcie al la reguloj en art. 5.1 kaj 5.2.

Art. 6 Organoj: Ĉefkunveno kaj Plenumkomitato

- 6.1 **Ĉefkunveno:** La supera organo de la Centro estas la Ĉefkunveno. Ĝian rolon difinas jenaj reguloj:
- 6.1.1 **Ordinara:** La ordinara ĉefkunveno okazas unufoje jare en loko kaj tempo, pri kiuj decidas la Plenumkomitato, se eble dum la Internacia Konferenco de N.E.M. Ĝi decidas pri la laborprogramo, buĝeto, sidejo kaj pri la agado de la Plenumkomitato, kontrolas la financojn, decidas pri la kontribuoj kaj kotizoj konforme al art. 5.5, elektas la Plenumkomitaton por tri jaroj, aŭ esprimas al ĝi malkonfidon pli frue, solvas la plendojn kaj decidas pri ĉiuj aliaj demandoj, kiuj ne apartenas al la kompetenteco de la Plenumkomitato.
- 6.1.2 **Eksterordinara:** En tempolimo de tri monatoj la prezidanto devas kunvoki eksterordinaran ĉefkunvenon, se membroj havantaj minimume du trionojn de ĉiuj voĉoj laŭ art. 6.1.4 skribe postulas tion. La eksterordinara ĉefkunveno havas la samajn rajtojn kiel la ordinara.
- 6.1.3 **Skriba voĉdono:** Se pro kiu ajn kaŭzo ĉefkunveno ne povas okazi, la prezidanto okazigas skriban voĉdonadon.
- 6.1.4 **Decidoj.** Kun la escepto de la decidoj laŭ art. 7 kaj 8, la decidoj estas farataj per simpla plimulto de la voĉdonintoj laŭ jena regulo: fondinto aŭ bonfaranto 20 voĉoj, apoganto 10 voĉoj, aktiva membro 1 voĉo. Se iu persono estas membro en pluraj kategorioj, la voĉoj estas adiciataj. En kazo de voĉegaleco la propono estas malakceptita.

- 6.2 **Plenumkomitato:** La agadon de la Plenumkomitato difinas jenaj reguloj:
- 6.2.1 **Konsisto:** La Plenumkomitato konsistas el prezidanto, unu aŭ pluraj vicprezidantoj, sekretario-kasisto kaj tiom da komitatanoj, kiom decidas la Ĉefkunveno.
- 6.2.2 **Tasko:** La Plenumkomitato realigas la decidojn de la Ĉefkunveno kaj ĉiujare raportas al ĝi pri sia agado.
- 6.2.3 **Funkciuloj:** La prezidanto reprezentas la Centron, kunvokas kaj prezidas la kunvenojn kaj kunsidojn, okazigas la voĉdonadojn kaj, kune kun la sekretario-kasisto, subskribas la protokolojn; la vicprezidanto(j) helpas kaj, se necese, anstataŭas la prezidanton; la sekretario-kasisto prizorgas ĉiujn administrajn kaj financajn aferojn de la Centro. Cetere ĉiuj membroj de la Plenumkomitato dividas inter si la laboron.
- 6.2.4 **Decidoj:** La decidoj de la Plenumkomitato estas farataj dum kunsidoj aŭ skribe per simpla plimulto de la voĉdonoj. En kazo de voĉegaleco decidas la prezidanto.
- 6.2.5 **Sindeventigo:** La Centro materie sin devontigas per la subskriboj de la prezidanto aŭ anstataŭanta vicprezidanto kaj de la sekretario-kasisto.

Art. 7 Ŝanĝo de la Statuto

La art. 2 (Deklaro de Principoj) kaj la art. 3.1 (Celoj) ne estas ŝanĝeblaj, sed ili povas esti precizigitaj aŭ kompletigitaj en la sama spirito de neŭtraleco kaj humaneco per du trionoj de ĉiuj voĉoj; por ĉiuj aliaj ŝanĝoj necesas simpla plimulto de voĉoj de ĉiuj ordinaraj membroj. En ambaŭ kazoj la nombro de la voĉoj estas kalkulata laŭ la regulo en art. 6.1.4.

Art. 8 Dissolvo

- 8.1 **Deviga dissolvo:** Se la Ĉefkunveno konstatas per du trionoj de la voĉoj de ĉiuj ordinaraj membroj, ke la celo preskribita en art. 3.1.5 estas atingita, ĝi devige dissolvos la Centron kaj nomos Komisiiton aŭ Komisionon por likvidi la ŝuldojn kun instrukcio transdoni la restantan havaĵon al Universala Esperanto-Asocio.
- 8.2 **Dissolvo pro ŝuldoj:** Se la ŝuldoj tiom transpasas la financajn rimedojn, ke la Centro frontas gravajn financajn malfacilaĵojn, la Ĉefkunveno povas dissolvi ĝin per simpla plimulto de la voĉoj de ĉiuj ordinaraj membroj kaj nomi komisiiton aŭ komisionon por likvidi la ŝuldojn. Prenante en konsideron la altecon de la tuta ŝuldo kaj la kostojn de likvido, la Ĉefkunveno samtempe decidas kiom ĉiu bonfaranto kaj apoganto devas proporcie kontribui por pagi la ŝuldojn konforme al art. 5.1.2 kaj 5.1.3.
- 8.3 **Libervola dissolvo:** Por dissolvi la Centron pro aliaj kaŭzoj estas necesa plimulto de du trionoj de la voĉoj de ĉiuj ordinaraj membroj. En tiu kazo devas esti farita decido ankaŭ pri la havaĵo de la Centro kaj nomita komisiito aŭ komisiono por likvidi ĝin.

En Strasburgo, la 31-an de julio 1980

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Oktobro, 1980.

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobato diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: «Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u».

Prezidanto: *W. Auld*

Sekretario: *D-ro A. Goodheir*

ĜOJAN KRISTNASKON

FELIĈAN NOVAN JARON

VI-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Strasburgo, 26 julio - 1 aŭgusto 1980

Pli optimisma

— Jam ĝi estas for, kiel multaj similaj aranĝoj dum la jaroj. Nur la bela bruna te-keto, donaco de la urbo Strasburgo, estas videbla signo de la semajno. Malferminte kaj trafoliumante ĝin mi klopodas malkovri por mi mem, kial ĝuste tiu ĉi konferenco tamen estis iom pli esperplena ol la kvar antaŭaj, kiujn eblis al mi partopreni. Kial almenaŭ mi vojaĝis hejmen pli optimisma, pli gaja ol iam antaŭe dum tiuj lastaj ses Esperanto-jaroj.

La teka enhavo ne tuj donas la respondon. Ĝi similas al la jam delonge konata. La konferenca signo kun la nomo mia, ekskursaj biletoj, manĝobiletoj, multkoloraj prospektoj kaj broŝuroj pri la belega urbo kaj pri la cirkaŭantaj pitoreskaj montoj, Vozejoj. Plue gravaj kaj utilaj informoj, listo de partoprenantoj kaj fine la ĉiutaga horaro.

La urbo Strasburgo

La prospektojn kaj la broŝurojn mi tuj formetas, eble iom hezite; ili memorigas min pri eksterordinare bela kaj bonkonservita urbo, plenigita per domoj, kiuj pruvas ĝian riĉan kaj influan historion, kaj la amcn, kiun donas al ĝi la loĝantoj. Vere Strasburgo estas valora kaj trafa kadro de internacia humaneca konferenco, briko en tiu mozaiko de la konferenca sukceso.

La Partoprenantoj

Listo de la Partoprenantoj. Ĉu ĝi? Jes, almenaŭ parte ĝi respondas. Ĝi ne estas longa — nur loo — sed intelekte ĝi estas riĉa. Multajn mi jam konas, iliajn lojalecon, obstinon, fidon kaj laborpovon, sed ankaŭ iliajn gajecon, humoron, amikecon. Varmige revidi amikajn vizaĝojn kaj reaŭdi karajn vĉojn. — Cetero almenaŭ ankoraŭ unu altrudis al si lckon en ĉies koro, nome Marianne Muller, la ĉefa kaj preskaŭ sola aranĝanto de la ĉijara NEM-konferenco. Ĉie kaj ĉiam ŝia milda voĉo aŭdiĝis, perfekte ŝi planis kaj aranĝis ĉion, ĉu la distrajn, ĉu la kulturajn, ĉu la fakajn kaj laborajn partojn de la konferenco. Kiel bona mastrino ŝi elradiadis iun tre agrablan atmosferon, kiu ĉiam por mi signifos la etoson de la Strasburga konferenco.

La regreso de UEA sentebla

Tamen — ankoraŭ mi ne menciis la plej esperportan parton de la partoprenantoj. — La relative multajn novajn kaj junajn vizaĝojn, kelkaj el ili nur turistis, sed la plej multaj estis konsciaj kaj viglaj partoprenantoj ankaŭ en niaj multaj laborhoroj. La plimulto jam serĉis labor-eblecojn en la kadro de UEA, sed trovis la kampon tie tro malvasta kaj seniluziiga, kvankam ili ne konis la eventojn de Hamburgo. Cenzurado kaj maltaŭgeco ĉiam finfine malkovras sin mem, se nun nur tio okazus pli grandskale antaŭ ol la regreso iĝos ankoraŭ pli katastrofa. Jam nun ĝi forglutis la atingojn de la lastaj jardekoj. Tian evoluon ni devas bremsi kaj rekonkeri la perdon.

La fizikaj kaj kulturaj kadroj

La kadro de la konferenco estis perfekta. Unue la internaciaj tradicioj de la urbo Strasburgo, due la ebleco konferenci, loĝi kaj manĝi kune kaj samloke — kaj ankaŭ malmultekoste, grava avantaĝo por intima kaj labora konferenco. La konferencujo mem estis bela kaj lumplena salono kun sufiĉe da sidlokoj, riĉa libro-servo kaj malgranda bufedo por la necesa sinfreŝigado ĉe malgrandaj tabloj. Moveblaj vandoj ebligis dumtempe dividi la ejon en laborejon por la plej aktivaj kaj babilejon por la ceteraj. Ne pli, ne malpli ol bezonate. Grandaj belaranĝitaj bukedoj, kiuj bone konservis sin dum la tuta semajno festigis la atmosferon. Saman efikon donis la inaŭgura muziko, la kultura vespero kun sia muziko kaj popoldancado, la vizito en la urbo tra la malnovaj stratoj kun tiom da riĉe ornamitaj domoj, ke oni povus uzi tutan semajnon nur por gape migri tra ili. Kelkfoje sidante en gravaj diskutoj, por kiuj oni fakte tiom longe vojaĝis, oni povas demandi sin mem pri la valoro de tiu distra parto de tiaj konferencoj — ĉu ili ne estas superfluaĵ — temporabazaj? Sed poste oni devas konfesi, ke ili havas la saman valoron kiel la konferencaj floroj, ili ornamas la semajnon, restas en la memoro kaj riĉigas la animon. Mi neniam forgesos la majestatan aspekton de la katedrala interno dum la spektaklo «Lumo kaj Sono»: sed ankaŭ ne la ĉarmajn, florornamitajn vilaĝojn en la mildaj Vozezaj montoj, kiujn la tuttaga ekskurso ebligis al ni vidi. Vere ankaŭ tiaj aranĝoj apartenas al la kadroj de bonaranĝita konferenco kaj levas ĝin el la ĉiutageco.

Tamen tio, kio donis al tiu ĉi konferenco historian aspekton, estis la unuanima deziro plifortigi kaj daŭrigi la klopodojn por konservi la Zamenhofan linion en la Esperanto-movado. Kvankam ni en NEM devus konfesi, ke ni ne sukcesis dum tiuj ses jaroj vekti la konscion en la plej multaj el la esperantistoj, ke la situacio en UEA post la ŝanĝo de ties statuto estas ankoraŭ pli grava, ni ĉiuj sentis la neceson daŭrigi. Dum la diskutoj — longaj kaj profundaj — maturiĝis la ideo fondi — ne grandan ampleksan amasmovadon kiel UEA — sed fortan malgrandan centron de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Centron, kiu povas kunligi ĉiujn fortojn, kiuj pensas kaj agas laŭ la Zamenhofa linio, Centron de homoj, kiuj pretas oferi kaj monon kaj tempon por iri antaŭe, gvidi la vojon, strikte obeante la jam konatajn principojn. Tial la kotizo por ĝi membro estas relative granda, ĉar la ĉefa tasko estas vivteni la voĉon de la Neŭtrala Movado, «Horizonto». Ĉiuj, kiuj sentas sin «ordinaraj membroj» de la Neŭtrala Esperanto-Movado povas tion montri per abono de «Horizonto», kaj tie kaj tiel levi sian voĉon.

Kion ni ne celas?

Estis forte — ankaŭ en la centra statuto — substrekite, ke ni deziras nek detru, nek konkuri kun UEA. La plej avantaĝa, kio povis okazi por UEA kaj por la tuta Esperanto-movado, estas, ke UEA revenas al sia ĝusta vojo, sed verŝajne la tuta homaro devas iĝi politike pli konscia antaŭ ol tio okazos. La plej multaj homoj ankoraŭ ne travivis la feŭdalan stadion, kie oni lasas sin blinde gvidi, obeas la mastrojn sekvas la plimulton. Por la plej multaj esperantistoj UEA estas la Esperanto-lando, en kiu ili vivas kaj pri kiu respondecas la Centra Oficejo. La jara festivalo estas la kongresoj, sed pri la movado kiel batalanta forto, kies ĉefa tasko estas solidariĝi la homojn kaj ebligi veran pacon, ili nur sin okupas en belaj paroladoj. Tio ne povas esti alie, tio ĉiam estis, kaj verŝajne ĉiam estos. La katastrofo estas, ke tiuj, kiuj pensas alimaniere, ne plu gvidas UEA, ke por la nunaj gvidantoj sufiĉas belaj kongresoj. Oni miru, kio nun okazos, post la lastaj ŝanĝoj en la Estraro. Ĉu ĝi igos nian novan centron superflua? Hura, se tio!

La fakaj laboroj

Nun pardonu, mi revenu al mia temo, la konferenco de NEM, ĝiaj faka kaj labora flankoj, kiuj komenciĝis per la inaŭguraj paroladoj. Ĉeestis la Strasburga urbestro, kiu en sia salutparolado emfazis la rolon de Strasburgo en la Eŭropa vivo, kaj kiun rolon povus ricevi komuna neŭtrala lingvo por la kreado de Eŭropa konscio. Li deziris al ni feliĉan kaj fruktodonan restadon en sia urbo, bone elektita por internacia laboro. Poste li atente aŭskultis la inaŭguran prelegon pri «La ideo signifo de la Internacia Lingvo» same brile kaj elokvente prezentita de prof. d-ro Ivo Lapenna, kiel ĉiam. Mi ne povas ne kapskui, kiam mi rememoras kiel Woessing flustre konfesis al mi en 1975, ke mi komprenu, ke fakte Ivo Lapenna iĝis iomete senila. Se vi emus aŭskulti kiel brile prelegas jam dum jaroj senila profesoro, sendu al mi malplanan kaseton, kaj mi povos ĝin reŝendi plaŭgita per tiu parolado, ĉar mi registris kaj ĝin kaj la konferencon entute. Vi povas alvoki la profundan analizon de Jean Thierry pri la obstakloj kreitaj de la lingvo-diferenceco en Eŭropo, aŭ aŭdi pri la impona energio de Helmar Frank, aŭ pri la vigla debato, kiu vekis la demandon pri la estonteco. La resumojn de la paroladoj kaj diskutoj vi povos legi aliloke, same pri la rezolucioj kaj la statuto de nova centro; tio, kion mi deziras emfazi, estas la amika instiga atmosfero, la entuziasmo de ekz. Hernández, kiam li grandanime proponis sian memkreitan Esperanto-kolekton kiel novan Centron de Dokumentado kaj la absolutan fidon je nia laboro.

Venontjara konferenco

La venonta konferenco okazos en 1981 en Humlebæk, Danlando, la 12-18. de julio. Al tiu belega grandbienejo kun siaj komfortaj salonoj, agrablaj ĉambroj, abunda manĝaĵo kaj vasta parko, situanta proksime al freŝa strando en unu el la plej belaj regionoj en Danlando, ni invitas ĉiujn interesitojn partopreni en la planado: Kiel ni plej digne, plej brile, plej impone festos la 100-jaran datrevenon de Esperanto en 1987.

Lis Thune

ETAJ PENSOJ PRI INTERHOMAJ RILATOJ

La SES plej gravaj vortoj: Vi bone sukcesis fari la taskon.

La KVIN plej gravaj vortoj: Mi konfesas, ke mi eraris.

La KVAR plej gravaj vortoj: Kio estas via opinio?

La TRI plej gravaj vortoj: Bonvolu, mi petas.

La DU plej gravaj vortoj: Mi dankas.

La UNU plej grava vorto: Ni.

La PLEJ MALGRAVA vorto: Mi.

El «Bona Espero», Oktobro 1980

KIAM FLORAS LA TIMIANOJ

Kiam floras la timianoj
pretigas sin la ravaj rozoj,
balanciĝas la ruĝaj papavoj,
trilas sonore la birdetaĵoj voĉoj,
la hirundoj fluge ludetas,
ĉion la suno varmlume banas,
la marondoj ŝaŭme impetas
kaj majeste staras la montoj altaj.

Kiam la timianoj floras
fariĝas ruĝaj la ĉerizoj,
la fruktarboj verde pompas,
la kampoj ŝajnas vastaj tapiŝoj,
nektaron kolektas la abeloj,
flugas papilioj plurkoloraj,
arome blovas la venteto
kiam la timianoj floras.

Kun timianoj venas printempo,
kun printempo la belaj floroj,
kun la floroj, animaj sentoj,
kun la sentoj, amo de l' koroj.
Kaj jen naskiĝas dek iluzioj,
jen vibras aliaj cent pensoj,
jen la koro ebria je mil pasioj
eksploras pro dek mil revoj.
Vidu, la Amo, ne iras sole:
Tie, flugas papilia paro,
sur rozujo la rozoj grapole,
kaj ĉirkaŭ reĝino, tuta abelaro.
Ĉio konverĝas al unu celo,
ĉio, al Amo, submetiĝas:
Vagas kune en ĉielo la steloj,
kaj akvogutoj en maro senfina.

Kiam la timianoj floras
ankaŭ ekfloras potence
la deziroj kiuj sin trovas
en la homa koro, latente.
Vi kaj mi, amatino kara,
vane nin turnentas kalvarie,
vivante dise, unuope, aparte,
sole, enue, malharmonie.

Mi volus vin je mia flanko
per ame, dolĉe vin karesi
kaj kun bola ardo en la sango
la viajn en miaj manoj teni,
kaj per kisoj kovri vian kapon,
kolon, vangojn kaj la lipojn
kaj premi vin per ĉirkaŭbrako
ĝis ekkrakus niaj ripoj.

Salvador Gumà

EL LA SEKRETARIA MEMUARO DE LA 19-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Tiu dua okazigo de la Internaciaj Floraj Ludoj de post ilia abisma longtempa mutiĝo, estas nova kaj esperplena mejloŝtono de vojirado kiun ni deziras ke estu daŭra, eventa kaj celtrafa. Forpasis, do, jam unu jaro de kiam ni, plenaj je emocio kaj sensper-tiĝo, restarigis la gloran Feston kun evidenta deziro ke nova kaj senfina kronologio al-tiru nur bonajn aŭgurojn de altranga beletra kreado kun tiu sama spirito de ilia komen-ĝa epoko.

Al tiuj samideanoj kiuj en la jaro 1909-a, kaj plue, sukcesis planti kaj bredi tiun arbi-don kiu tre baldaŭ fortike kaj profunde enradikiĝis en la grundo de Esperantujo, bele kreskis, abunde frondis, bonfarte dikiĝis, bunte floradis kaj malavare fruktadis ĝis la jaro 1936-a; al tiuj forpasintaj samideanoj, Gloron ni aljuĝu! Ni plene konscias ke ili devis persiste penadi kaj laboradi senripoze kaj efikplene. Al ili, do, ni turnas nian ri-gardon kun admiro kaj laŭdado, agnoskante ke dank' al ili — dezirante ilin imiti —, ni ankaŭ kuraĝis alvoki poetojn kaj prozistojn.

Sen la pionira entreprenemo kaj efektiva laborstreĉo de tiuj, kiuj okaze de la V-a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono, kiel dirite, organizis la unuajn Florajn Ludojn, kaj de tiuj aliaj kiuj daŭrigis persiste ilian okazigon ĝis la jaro de la lasta Kon-greso de la Kataluna Esperanto-Federacio, ni ne estus havintaj nek simplan ideon, nek sufiĉan kapablon, organizi tiun renovigitan Trobadoran Feston.

Se ni reokazigas ĝin laŭ tiu inda ŝablono de la dek-sep antaŭaj — malgraŭ tiu kvar-dekjara abismo de forestado —, en 1909-a Frederic Pujulà i Vallès kaj liaj intimaj kun-laborantoj prenis sur sin, kiel propran, la etosan mesaĝon de la gloraj kaj tiam famaj Floraj Ludoj de Barcelono, kiuj ankoraŭ nuntempe rangas kiel rara floro de mistera parfumo tributanta honoron al la miljara kataluna lingvo.

Sed, la katalunlingvaj Floraj Ludoj de la kataluna ĉefurbo, kiuj komencis sian mo-dernan stadion en la jaro 1859-a, deziris esti dignaj heredantoj de tiuj antaŭaj, kiuj en la jaro 1393-a organizis unuafoje la kataluna-aragona grafo-reĝo Johano la I-a kiu, siatemp-e, sentis sin allogita de tiuj originaj, kiuj en Tuluzo de Okcitanujo, en 1323-a, komen-ĝis solene okazadi alvokante la tiutempajn poetojn de la vera trobadora skolo. Do, kiom da historio! Por ni, katalunaj esperantistoj, la radikoj de la IFL devenas, almenaŭ, de ses jarcentoj antaŭe!

Familiaraj povas esti, certe, al ni, tiuj poetoj tiel diversepokaj kaj diverstilaj kiel Arnau de Castelnaudari — la gajninto de la unua Violo el oro —, Joan Blanc, Bernat de Palol, Guillem de Masdovelles; Víctor Balaguer, Rubió i Ors, Jacint Verdaguer, Angel Guimerà, Joan Maragall, Josep Carner; Artur Dcmènech, Jaume Grau Casas, Marie Han-keL, Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Teo Jung, Jan van Schoor... Jen, do, poetoj katal-un- kaj esperantlingvaj. Pri tio mi meditis antaŭ ne longe, en Vilafranca del Penedès, vidalvide de la bela monumento starigita honore al Milà i Fontanals, kiu estis la unua Prezidanto de la restarigitaj Floraj Ludoj de Barcelono en la jam citita eventa jaro 1859-a. Milà i Fontanals eldiris la Festparoladon kiu estis la unua de pli ol centnombra vico. La plej eminentaj literaturistoj, politikistoj, juristoj, sciencistoj, artistoj ktp, prezidis sia-tempe, dum la longa historio de la FL de Barcelono, la respektivajn konsistoriojn.

Malgraŭ ĉio, la FL ĉiam havis, kaj ili ankoraŭ havas, kontraŭstarantojn, same kiel neniam kaj nenie mankas misprofetoj aŭ fiaŭgurantoj je malbono. Tamen, ilia fiasko neniam okazis. Rezulte de tio, la FL kontribuis pli kaj pli al la fakto ke la tiel nomata Renaskiĝo kultura kaj lingva de Katalunujo, enradikiĝu pli kaj pli profunde en grundon kiu antaŭe aspektis nur arida kaj ŝtonplena. Ni nur skize memorigu ke de la jaroj 1941-a ĝis 1970-a — dum estis malpermesata ilia okaziĝo oficiala en Barcelono —, la FL ansta-taŭantaj celebrigis ĉiujare en eksterlando, kaj ke ili fariĝis la precipa ligilo inter elmi-grintoj, ekziliĝintoj kaj tiuj kiuj restis en Katalunujo alsopirante perditajn kulturajn raj-tojn; kaj ke per la FL miloj da katalunoj trovis inter si planan identecon sub la tri-bla devizo kiu tekstas jene: «Fideleco, Patrujo kaj Amo». Tamen, multaj el tiuj personoj, kiuj antaŭe konsideris ke tiu Poezia Festo estis jam tro arĥaika aŭ, simple, reakcia, estis la plej fervoraj subtenantoj.

Mi supozas, kaj konjektas, ke la esperantistaj Floraj Ludoj, en la nuntempo, ne vekas nek altiras tiun saman entuziasmon de antaŭa epoko, eble, i.a., pro la faktoj de la ĝis nun longa interrompo aŭ ĉesado. Do, ne strange, la nunaj kaj junaj generacioj de espe-rantistoj konas malmulte tiun florantan epokon kaj la iom romantikan celon kiun ni, bonintence, klopodas adapti al la nuntempo, kaj malkovri ĝin al novaj idealistoj.

Gabriel MORA i ARANA

LA ALĤEMIISTO

La alĥemiisto subite paliĝis tuj post digesti la lastan ceferon. Li stariĝis de sia benketo kun tremantaj manoj, forgesante disŝuti cindron sur la paperon por sekigi la inkon. La folio glitis el inter la tremantaj fingroj, falante planken.

— Majstro... kio okazas al vi?

La juna helpanto, modesta lernanto kiu aspiris posedi ankaŭ iam la alĥemian sciencon, rigardis maltrankvile sian mentoron. Li petis tiun laboron por eviti ke sia moŝto, la grafo, anigu lin al la feŭdoroto, kunprenante lin al batalo kontraŭ la islamoj. Li estis malamiko de la perforto, kaj sufiĉe sagaca por scii ke li havus malmultajn eblecojn postvivi batalon kontraŭ la sovaĝaj saracenoj.

Lia grafa moŝto sendis lin al la alĥemiisto por ke li iniciĝu pri la misteroj de la esperiga scienco per kiu iam oni malkovros la filozofian ŝtonon, kiu ebligos konverti la metalojn en oron kaj eltrovi la vivelikŝiron. La longaj monatoj vivitaj en la subteretaĝo de la kastelo, kie ilia mecenato permesis al ili loĝi kaj eksperimenti por profiti la unua de iliaj eltrovoj, instruis al la junulo estimi sian majstron.

— Kio okazas, sinjoro? — Li ripetis prenante de la planko la falintan paperon kaj donante ĝin al li.

— La enigmon de la tempo! — Diris la alĥemiisto ekscite. — Mi ĵus deĉifris la enigmon de la tempo!

— Mi ne komprenas vin, majstro. Ĉu utilas koni la enigmon?

— Kompatinda! Kiom da vojo vi devas ankoraŭ trairi!

La maljunulo komencis pesi determinitajn kvantojn de substancoj ricevataj per distiloj kaj sekigoj en distililoj kaj retortoj post miloj da elvaporigoj.

— Ni povos translokiĝi en la estonton! — Li informis ankoraŭ nervoza kaj ne lasante sian laboron.

— Mi venis al la konvinko ke Spaco kaj Tempo estas konceptoj afinaj.

— Nun mi scias ke la Tempo estas nur iluzio, kaj la realo kvazaŭ grandega bildo kie ĉio estas nuntempo. La hieraŭo, la hodiaŭo, la morgaŭo...

Li turnis sin al la dikaj libraĉoj kiuj servis al li kiel konsultiloj, prenis la plumon de birdo, trempis ĝin en la inkujo, kaj denove skribis antaŭ la atenta rigardo de la knabo.

— Jes! Jes! — Li anhelis — Eblas fari saltan en la estonton kaj viziti gentojn kaj urbojn, kiuj ekzistas en venontaj jarcentoj! Mi tuj faros ĝin. Mi iros en la estonton kaj revenos rakonti kion mi vidos...

— Sinjoro! Meditu! — petis la impresita helpanto — Ĉu vi ne timas eraron? Akcidenton! Kiaj nekonataj danĝeroj povas esti en la estonto?

La alĥemiisto trankviliĝis iomete. Milda rideto floris sur liaj maldikaj lipoj.

— Vi estas konscia malgraŭ la diablo de la juneco... Ne timu, ĉar mi ne estas frenezulo. Ĉu vi scias ke, en la relativa universo kie ni loĝas, estas konstanto kiu garantios min? Tiu konstanto estas la paralelaj linioj. Ili neniam kuniĝas. Konstante ili plilongiĝas al la senfino en la Spaco kaj la Tempo... Se mi lokiĝas inter du paraleloj tie ĉi, tiuj paraleloj troviĝos tie ĉi ankoraŭ post mil, post milionoj da jaroj. Tial vojaĝante garantie inter du paraleloj, mi ne ekaperos interne de monto aŭ en la fundo de maro.

— Se vi diras ĝin...

— Tiel estas.

— Ciel, sinjoro, mi dubas, mi timas pri vi.

— Naiva junulo! — ridis la alĥemiisto — La paraleloj estas neperfortebla konstanto. Se mi manipulas la tempon inter la aero de du paraleloj, mi estas certa ke tiuj linioj ekzistos en la estonto kaj inter ili ankaŭ estos vitala spaco. Alportu la distilajon!

— Ĉu nenio igos vin rezigni?

— Nenio! Mi perfortos la tempon kaj vizitos ĉi urbon kvincent jarojn for en la estonto. Jen estas la paraleloj...

Li sitiĝis inter la du linioj desegnitaj de la grandaj slaboj de la planko, lasis fali inter siajn piedojn la pezan substancon kaj la koncentritan likvon; kaj densa kolono da fumo leviĝis antaŭ li. Tiam, la maljuna alĥemiisto enmetis la fingrojn en ĝian centron, turnis la tempon kaj malaperis antaŭ la perpleksa rigardo de sia helpanto.

La alĥemiisto rigardis ĉirkaŭ si triumfe kaj admire. La faktoj pravigis lin. La paraleloj, efektive, estis konstantaj. Li troviĝis inter ili, kvankam tiuj ĉi estis malsamaj kiel tiuj de lia laboratorio. Ili brilis kiel la metalo de la spadoj de la armeo de la grafo, kaj havis kvazaŭ etan kanalon en sia centro.

Personoj nekredible vestitaj kaj konstruataj, kiajn neniam li revis, plenigis lian vidkampon. La alĥemiisto volis krei sian triumfon, sed li ne sukcesis tion fari.

Cirkulante rapidege sur la paraleloj inter kiuj troviĝis la alĥemiisto, alvenis tramo. La alĥemiisto, kiu ne sciis tion, kio ĝi estis, ne povis deflankiĝi ĝustatempe. Kaj tial, ke la bremsoj de la tramoj neniam elstaris pro sia efikeco, kvankam la ŝoforo plene manipulis ilin tuj kiam li vidis aperi antaŭ si tiun ekstravagancon figuron kun longaj blankaj haroj kaj florsanta tuniko, la tramo, grincante akre, surpasis la korpon de la kompatinda alĥemiisto...

Aŭtoro: P. G. M. Calin

Elkastiliigo de: Liven Dek



LA FENDISTO DE SANKTULOJ

El la kolekto de rakontoj de Josep Aladern (Cosme Vidal) 1869-a - 1918-a, «La Gent del Llamp» (= La homoj de l' Fulmo).

Li naskiĝis en vilaĝo Alcover de la kataluna regiono de Hispanujo. Baldaŭ li distingigis elstare el la tiamaj nesciaj vilaĝanoj.

Okaze de la centa datreveno de lia naskiĝo, Alcover omaĝis lin. Mi, samvilaĝido, prezentas al la mondo specimeneton de lia multfaceta verkaro kiel humilan omaĝon al tiu vigla, grava kaj liberala talento.

Salvador Gumà

Garriguet (1), la lerta kaj maljuna fendisto de brulligno, la tutan antaŭtagmezon hakadis la tenacajn trunkojn de olivujoj portitaj el la kampo. Tiuj trunkaĉoj estis vere torditaj kaj ne spliteblaj, plenaj je nodoj kaj kolore striitaj kiel porka lumbajo! Sed tio ne ĝenis lin. Garriguet, fajfante rigardadis la trunkon, ekturnis ĝin al unu flanko, returnis ĝin al la alia, kaj trovinte la fendigan punkton li surmetis la trunkon konvene sur la hakoŝtipon kaj per du hakoĵoj la trunko fendigis. Kiam la trunko estis fibre tro kuntordita kaj la hakilo ne povis enpenetri, li ekprenis kojnon, alŝutis al ĝiaj vangoj terpolvon por ke ĝi ne elsaltu, li ŝmiris salive la manojn kaj eklevante la maleon li frapegis la kojnon, kiu per eniĝo fendis la trunkon tuj kraketantan kvazaŭ rompata kukurbo; tiam tiu ligno malkovris ŝian striitan kòron, gliman, novan kvazaŭ ĵus pentritan kaj ŝajne manĝeblan kiel duongrasa lardo.

Iafoje la afero ne prosperis tiel bone, kaj post la unua bato aŭ post la dua la kojno resaltis kiel kuglo sufiĉe forte por rompi la krurojn de proksima staranto; aŭ la hakilo, eniĝante rapidege, eklevis fluon da splitetoj kapablaj enpikiĝi kiel sagoj pafitaj de sovaĝula fleksebla pafarko.

Kiam Garriguet estis lasinta la laborilojn kaj sidiginta por ripoziga trinko, mi diris al li:

— Vi ja devas rekomendi vin al la graco de l' sanktuloj, pro via tiel danĝera metio.

— Se ili devus protekti min, mi ja defendus al mi la krurojn ĉiufoje li respondis mienante skeptike.

— Ha! Ĉu tiel malkonfida vi estas? Ĉu tiel senkreda? Vi ja iras en la preĝejon, mi ja vidis vin plurfoje preĝantan kaj ŝajnas al mi, ke vi kun aliaj portis la ta-

bernaklon de Sankta Antono dum procesio...

— Jes, tio estas vera; sed malgraŭ viaj konstatoj, mi ne kondukas tiel pie kiel antaŭe: la sperto instruadas kaj oni perdas la kredon. Ĉu ne vere?

— Ĉu do ia gravaĵo okazis al vi, Garriguet, ke vi tiel parolas?

— Certe, okazis al mi fakto, kiun mi neniam antaŭe estus kredinta, kun tiu..., tiu de la paroĥestrojo, la paroĥestro kiun ni nun havas.

— Nu, ĉu ian friponaĵon li faris al vi? Ŝajnas al mi, ke oni konsideras lin sankta kristano; neniam mi aŭdis eĉ la plej etan klaĉon kontraŭ li; ĉiu lin respektas...

— Mi konsentas. Ankaŭ mi konsideras lin bonulo; sed li faris al mi ion, kio ŝtonigis min!... Li stompis mian kredemon!

— Nu, Garriguet, vclu prirakonti al mi! — mi petis scivolemne ne povante kompreni kian friponaĵon la paroĥestro povis esti farinta al lignofendisto —.

— Okazis do, — ekdiris Garriguet — ke la lastan vintron mi estis senlabora kaj senmona, kiam la paroĥestro venigis min al li, kaj diris: «Nu, Garriguet, laŭ via intenco, kiam vi pagos al mi tiun ŝuldeton pri la morto de via patro?» (Ĉar mi ŝuldis ankoraŭ lian enterigon kaj ankaŭ la ĉerkon, ĵus elpagitan. Komprenu, se oni estas malriĉa kaj ne povas...)

— «Ho, mi pagos, jes, sinjoro paroĥestro; sed nun mi vere ne povas» — mi respondis — «Atendu la someron, eble oni elŝiros olivujojn, kaj se mi laboros...» Antaŭ ol mi finis paroli li replikis senhezite: «Nu, mia kara! Mi ja komprenas ke vi ne povas pagi; mi alvokis vin nur por aranĝi per unu fojo tiun ĝenaĵon, ĉar nenio ĉagrenas min pli ol la malnovaj kontoj.

Mi ne volas ke vi donu monon al mi. Vi ŝuldas ok pesetojn; vi do venos du tagojn fendi lignon por mia kameno ĉar pro la nuna malvarmego konsumiĝas tiom da ligno, ke mi ne scias tra kie ĝi foriĝas. Ĉu vi konsentas?».

— «Jes, sinjoro, jes! — mi respondis — Ĉu grave? Du aŭ tri tagojn; la tutan brullignon kiun vi havas! Kaj se interfluos iom de tiu vino, kiun vi uzas, vi jam povas alportadi trunkojn kaj ŝtipojn.»

La postan tagon je la krepusko mi venis la paroĥestron kun la hakilo, la maleo, kaj la korbeto kun la kojnoj. La paroĥestro estis celebranta la unuan meson de la tago. Malfermis al mi Roza, lia mastrumantino, al kiu mi diris: «Nu, kion mi devas spliti?» KREDU, mi havis surprizon! Roza kondukis min al la korto, kaj montris al mi, sub tegmento, malnovan altaron tute malmuntitan, kaj diris: «Ekfendution-ĉi». — Mi ŝtoniĝis! — «He, knabino! — mi respondis — kiu do ordonis tion? Ĉu vi ja bone komprenis ke mi devas spliti tiun altaron?» —

— Ĉu vi ne vidas ke ĝi estas malnovega? Por kio alia ol fajro ĝi taŭgus? — ŝi respondis — Tute mankas alia brulligno en la domo. «Efektive alia ligno ne troviĝis en la korto. — «Ĉu ankaŭ la sanktulojn?» — Mi demandis redubante. — «Ĉion, ĉion, ĝis neniigo» — ŝi respondis — Eĉ ne unu fratrasero restu». Vere, mi restis stare kiel trunko, kvazaŭ radikoj estus elkreskintaj el miaj piedoj. Neniame antaŭe mi troviĝis antaŭ simila okazo. Ĉu vi kredas ke mi timetis levi la hakilon? Sed, ba, ba! — mi pensis — La paroĥestro scias pli ol mi, kaj se li tiel decidis, li scias kial. Se mi damniĝos, li estos jam antaŭe damnita. Mi metis kiel hakŝtipon pecon de kolono garnita per anĝeloj, uvoj, vitfolioj kaj aliaj bagateloj, ĉio skulptita, kaj alkuŝiginte altarpecon, ekkraĉis salivon al manplatoj jam prete ekpreni la hakilon kaj batadi la lignaĵon.

— Ĉu vi ne pensis ke Dio povus maltrafigi la baton? — mi diris al li —

— «Ne dubu... nur timante mi svingis la unuajn hakilbatojn». Eble Dio min punos — mi pensis — per misa bato kiu puŝos la hakilon al la piedo kaj ĝin fendos kiel rebon! Hak', hak', unue malfortete, korpemite de tiu timo; fine mi vigliĝis kaj la splitoj plezure elsaltadis. Kvankam iom vermotruita, tiu ligno estis keneca kaj je ĉiu hakilbato inter la fibroj, elsaltis splito laŭ la longo; poste, kvar transversajn batojn kaj mi jam havis plenbrakon da splitoj.

— «Kaj la sanktuloj, ĉu ili facile fendigis? Ili devis esti pli malmolaj ol la aliaj altaraĵoj.»

— «Pli bone ne memori ilin. Ankoraŭ ŝiras min la nura pripenso!» — respondis Garriguet kortuŝite — «Tio estas tiel certa, ke mi preskaŭ ne kuraĝis kuŝigi ilin sur la

teron; mi ŝovadis ilin al angulo kun granda zorgo kvazaŭ ili estus gardindaj relikvo. Sed fine, kiam restis nur tiuj personoj, kontraŭvole mi devis decidi batali kontraŭ ili per hakilo. Ĉu vi kredas, ke tio afliktis min? Hu! Mi eĉ tremis de angoro! Kiam mi vidis tiun Sanktan Paŭlon, kun tiu barbego, sternitan je miaj piedoj, tiun Sanktulon de la malnova altaro de la Sanktaj Apostoloj, kiu tiom da fojoj estis aŭskultinta mian preĝadon, kaj nun atendanta miajn hakilbatojn... vere, miaj kruroj ŝanceliĝis, la brakoj senfortiĝis kaj la hakilo volis elgliti el la manoj. Sed fine, hop! Mi levis la hakilon kaj je la unua bato lia kapo dissaltis kiel fendita akvomelono. Ankoraŭ timeme, kvazaŭ mi estus deliktinta, mi turniĝis posten; mi rigardis super la kortomuroj kvazaŭ oni devus gvati min kiel krimulon; eĉ al la ĉielo mi turnis la okulojn kun pli da timo ol al la tero; sed vidante ke oni ne gvatas min, hak', hak'! kontraŭ la respektinda Sankta Paŭlo. Kiam mi atakis lian korpon, ĝi mcentriĝis pli nefendebila; la hakilo ne povis enpenetri. Kion do? Mi lin turnis dorse, almetis kojnon, levis la maleon kaj klak, klak, Klak klak!! Per kvar frapoj fendiĝis lia dorso kaj ventro montrante internon gliman kiel keno kaj amerika pino, dum ŝajnis al mi pense, ke devis elsalti liaj ventraj visceroj». Dum mi haka-dis, aperis la paroĥestro je la kortopordo, kaj diris al mi:

— «Nu, Garriguet, kiel tio ŝvitigos vin! He! Ĉu do tre tenaca, necedema?»

— «Jes, sinjoro, iomete. Tiuj sannktuletoj...»

— «Ripozu momenton, vi ja bezonas, — diris la paroĥestro — Lasu la maleon kaj eniru por ripoziga trinko, kaj poste vi frapos pli forte, ĉar tio pli konsideras unu baton ol cent preĝojn.» — Guste tiel, kiel mi diris, per la samaj vortoj! Konsterna afero! Nun diru: ĉu tio ne estas sufiĉa por stompi ies profundan aŭ ne profundan kredon? Efektive, iun festotagon vi renkontas min en la preĝejo; ankaŭ vi vidis ke mi kune portas la tabernaklon de Sankta Antono dum la procesio; sed de post tiu fakto, mi ne plu kondukas tiel pie kiel antaŭe! Tial mi diris komence, ke se la sanktuloj devus protekti min...!

Kaj Garriguet, eklevante la vinkukuron longe trinkis, viŝis la lipojn per la mandorso kaj ŝmirinte la manplatojn per salivo reprenis la hakilon kaj rekomencis la taskon.

El la kataluna lingvo tradukis
Salvador Gumà

(1) Legu Gariget'

Cervantes, Ameriko kaj la Verko «Don Quijote»

La biografoj de Cervantes, el kiuj la ĉefa estis la hispana erudiciulo Mayáns y Siscar, kiu verkis la unuan konatan biografion de Cervantes represitan en angla eldono de «Don Quijote» de la j. 1731-a, tre malofte konsideris grava lian deziradon transveturi la Oceanon por ekloĝi sur Amerika tero.

Senreviĝinte pri Italujo kaj konstatante ke liaj prodaĵoj en Lepanto kaj suferado en Alĝerio neniel estis kompensataj, Cervantes, malkvieta spirito, logike pensis pri Ameriko, kiun iam li nomis «rifugejo kaj protektejo de la hispanaj malesperuloj» kaj «rifugejo de prodigaj malriĉuloj». Liaj unuaj intencoj forveturi al nova mondo estas konataj el letero al Antonio de Eraso de l' «Konsilio de Indioj» datumita en Madrido en februaro de 1852-a. Ok jarojn poste, en majo de 1590-a, li plu insistis per petskribo al la Konsilio petante ke «oni grace asigu al li unu el la kvar oficoj nun vakantaj po unu en la Kontistejo de la Nova Regno Granada (estonta Kolombio) kaj en la Provincestrejo Soconusco en Gŭatemalo, aŭ kiel kontisto en la Galeroj de Cartagena (Kartaĥena) aŭ kiel Koregidoro de la urbo La Paz».

Ĉar la verkaro de Cervantes invitadas mediti, ni povas demandi al ni: Kio okazus se la pripeton de Cervantes oni estus plenuminta? Ĉu li, kiel verkisto, estus pli aŭ malpli meritiginta? Ĉu el lia plumo ni estus heredintaj la plej brilajn paĝojn de la nova amerika kulturo aŭ li estus falinta en la abismon de la forlaso? Estas evidente kaj tremige: La libro «Don Quijote» neniam estus verkita.

Bonŝance por la hispana kaj universala literaturo, la Konsilio de Indioj per doktoro Nuñez Morquecho (Morkeĉo) respondis decide: «Serĉu tie-ĉi mem protekton por ofico». Tiam Cervantes estis 43-jara, aĝo ĉiam decidiga por homo firmkaraktera. Kaj probable tiu definitiva malsukceso devigis lin verki «Don Quijote». La genoj de l' protagonisto de la senmorta romano sendube jam de longe dancadis en la cerbo de Cervantes, sed verŝajne li sin detenis lanĉi lin en la literaturan varpon konsiderante tion tro aŭdaca, tro himera epopeo.

Vivigi frenezulon riskigas perdi la saĝon. Nur ne, se la frenezeco kuniĝas kun la malsukceso por defendi la justecon. La decida kaj kruela rifuzo de Morquecho impulsis Cervanteson nepre vivigi la Inĝenian Kavaliron «Don Quijote de la Mancha» kaj lanĉi lin sur la ĉiutagan, iom ne realan palestron de la penado, de la mizeroj kaj de la virtoj.

En januaro de 1605-a aperis en Madrido la unua parto de «Don Quijote» eldonita de librovendisto Francisco de Robles en la presejo de Juan de la Cuesta. Granda parto de tiu eldono tuj venis Amerikon, kiel povis determini Rodríguez Marín leginte la transportlistojn de la Casa de la Contratación en Sevilo (1). La libro estis trovinta pli senbarajn vojojn ol ĝia aŭtoro. «Don Quijote» komencis tiumaniere same en Ameriko kiel en Hispanujo la grandan aventuron postuli la gloron de Cervantes turnante ĝin filozofio kaj inspiro.

Abundega bibliografio konsistanta el centoj da artikoloj, aŭtoritatoj kaj eseoj manifestas, jarcenton post jarcento la sukceson de tiu-ĉi libro en la Nova Mondo. La esenco de tiuj verkaĵoj povus esti resumita per la vortoj de l' argentinano Alberto Gerchunoff: «Tian Hispanujon ni amas; tiun de la hispanoj venantaj al nia Ameriko kaj renovigantaj la supermezuran energiabundon de la eltrovintoj. Ili formas la Hispanujon de «Don Quijote». Aŭ per la vortoj de l' ĉilano Jaime Eyzaguirre: «Antaŭ lia kavalireco la indiaj fariĝis pliaj kavaliroj».

Super ĉio, kio vere mirigas, tio estas ke Cervantes por Ameriko kaj Hispanujo, hieraŭ same kiel hodiaŭ, sciis fari el «Don Quijote» konsistigan elementon de l' homa animo, nedetruoblan kunigilon inter la koroj kaj popoloj.

Aurelio Viñas Escuer

(el Heraldo de Aragón, 12-10-1980)

trad. *Inés Gastón*

(1) «Domo kie oni direktis kaj kontrolis ĉian komercadon kaj trafikadon kun Indioj.»

ORTOGRAFIA ĤAOSO / KAOSO EN ESPERANTO

Bernard Golden

La pensinstiga artikolo «Pri la landnomoj» de Salvador Gumà (1979) provizas espartologojn per abundo da materialo por analizo kaj pridiskutado. Ĉi-foje mi ne tuŝos demandojn pri la formoj de landnomoj; aliris mian atenton alia aspekto de la citita verko. Ĉar mi rimarkis similan fenomenon en aliaj Esperanto-publikigaĵoj, mi deziras porti la problemon en la taglumon. Temas pri ortografio en Esperanto, kiu, laŭ ĉiuj objektivaj kriterioj, estas arkaika. Fakte, aliloke mi nomis la uzon de tiaj vortformoj dialekta trajto de Old-Esperanto. Karakterizas ĝin la literado de vortoj per «ĥ», kiun progresemaj esperantistoj anstataŭigas per «k». Jen kelkaj ekzemploj ĉerpitaj el la artikolo de s-ro Gumà.

1. «la tabelo de ĥemiaj elementoj»
2. «por arto, teĥniko, scienco»
3. «vortoj rezultantaj el la meĥanismo de la lingvo»
4. «ĉesigus la hontigan ĥaoson»

Tiuj ĥo-vortoj preskaŭ saltas de sur la paĝoj de *Horizonto*, ĉar aliaj kontribuantoj al la revuo sekvas, ne novan, sed vere malnovan ortografian tendencon en Esperanto kaj literas tiajn vortojn per «k»: kemiaj, tekniko, mekanismo, kaoso. Kiu pravas, la arkaismemuloj aŭ la modernigantoj? La ĥo-skolo aŭ la ko-skolo? Ja ekzistas abundo da dokumentado por pravigi la vidpunkton de la ko-istoj. Unue, ni rigardu la pritrakton de kelkaj ĥo-vortoj en *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV - 1970), konsult-libro spegulanta la modernan tendencon.

p. 1090 — «teĥniko = tekniko»

p. 404 — «Ĥaribdo = Karibda... Rim. Same kiel pri la aliaj helenaj vortoj komenci-gantaj per Ĥ, serĉu sub K.»

p. 65 — «arĥ... Vd. ark...»

Sur p. 404 post la difino de «ĥemio» estas resendo al «kemio», kaj tiu ĉi vorto estas klarigita sur p. 504 kiel «moderna formo de «ĥemio»». Ĉiuj ĝiaj pluformitaj kaj kunmetitaj formoj havas «k»: kemiaĵo, kemiisto, elektrokemio, fotokemio, kosmokemio. La vortformo «arĥitekturo» aperas en *Universala Vortaro*, sed PIV preferas «arkitekturo».

Oni povas argumenti, ke nur la Akademio de Esperanto rajtas decidi, ĉu tiu tendenco estu tolerata aŭ ĉu ĝi estu kondamnita kiel kontraŭfundamenta atenco je la lingvo. Nu, la Akademio jam verdiktis. En ĝia oficiala publikigaĵo *Aktoj II* (1975, p. 12 k. sekv.) jenaj paralelaj formoj estas oficialigitaj: alĥemio/alkemio, arĥaismo/arkaismo, arĥitekturo/arkitekturo, ĥemio/kemio, meĥaniko/mekaniko, monarĥo/monarko. Aldoniĝas al tiuj duoblaĵoj ankaŭ: meĥanismo/mekanismo, monarĥio/monarkio, ĥirurgio/kirurgio, ĥirurgio/kirurgio.

Konservativaj ĝisostuloj eble protestos, ke la ĥo-vortoj estas zamenhofaj, do ili estas netuŝeblaj. Jen kelkaj ekzemploj, kiuj montras, kiel Zamenhof mem agis rilate tiun ĉi demandon.

La vorto «ĥaraktero» estis uzita de Zamenhof nur unufojon, en la rakonto «La Ombro», kiu aperis en *Dua Libro de l' Lingvo Internacia*, eldonita en 1888: «Vi havas noblan ĥarakteron!» Jam en 1889 en sia *Plena Vortaro Rusa-Internacia* Zamenhof ŝanĝis ĝin al «karaktero», kaj ĝi estas tiel registrita en *Universala Vortaro*. Aliaj fruaj zamenhofaj formoj registritaj en liaj Esperanta-rusa kaj Esperanta-germana vortaroj estas «teknoloĝo» kaj «kromo» (la metalo Cr).

Ignorante tiujn ekzemplojn de la vortuzo de la aŭtoro de Esperanto, la ĉefredaktoro de *Scienca Revuo*, Josef Kavka, insiste trudas al pluraj sciencaj verkoj ĥo-variaĵojn de tuta serio da vortoj. Inter ili estas ne nur helendevenaj vortoj literitaj per ĥi sed ankaŭ la gentnomo «ĥino», kiun la koncerna popolo mem skribas «ĉino»!

Tiu ĉeĥa scienculo-redaktoro nuntempe verŝajne estas la plej fervora probatalanto por la uzo de la litero ĥo en Esperanto, kaj neniu manuskripto, kiu trafas en liajn manojn estas imuna kontraŭ revizio. Tamen, kiam liaj verkoj estas traktitaj fare de aliaj redaktoroj, la kontraŭa procedo okazas, kaj la ko-ismo montras sin pli forta, kiel la sekvaj ekzemploj ilustras.

En *Scienca Revuo* (Kavka, 1978, p. 89) la malcedma redaktoro uzis la vorton «ĥarakterizi». Kiam la sama artikolo estis represita en la kolekto da prelegoj de la seminario «Sciencaj Aspektoj de Esperanto» okazinta en Ahrenshoop, GDR, en 1978, la germana redaktoro ŝanĝis «ĥarakterizi» al «karakterizi». Pro la influo de la redaktoro de *Scienca Revuo*, kiu estas ankaŭ la ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), aliaj publikigaĵoj en Ĉeĥoslovakio aliĝas al la ĥo-skolo. La informilo pri la seminario «Apliko de Esperanto en la Scienco kaj Teĥniko» (SAEST), okazonta en aŭgusto 1980 sub la aŭspicioj de la scienca-teĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, enhavas jenajn vortojn: teĥniko, ĥemio, teĥnologio, arĥitekturo. Kiam tiu programo estis represita en la junio numero de *Budapeŝta Informilo*, la hungara redaktoro substituis «k» al «ĥ» en ĉiu citita vorto: tekniko, kemio, teknologio, arkitekturo. En *Starto* (1979, n-ro 4, p. 20) aperis recenzo pri publikigaĵo enhavanta referaĵojn prezentitajn dum simila seminario en Slovakio en 1978. La recenzinto mem uzis la vortformon «tekniko» kaj ĉe la fino

skribis: «Laŭ lingva vidpunkto iom ĝenas la neunueca uzo de la radiko teknik-/teĥnik». Miaopinie «iom ĝenas» estas tro milda esprimo; mi dirus, ke la uzo de la radiko «teĥnik» anakronisme agacas la lingvosenton de bonaj esperantistoj.

Kiu ankoraŭ ne estas konvinkita pri la arkaikeco de ĥo-vortoj, legu jenajn opiniojn cititajn el verko de la aŭtoro de Esperanto. Li skribis, ke «ĥ» estas litero «tre malofte renkontata kaj baldaŭ espereble tute malaperonta...». Pritraktante reformojn en Esperanto, Zamenhof diris, ke «la sono «ĥ» estos tute elĵetata», ĉar «por tre multaj personoj [ĝi estas] tro malfacile elparolebla...». Li konsilis, ke «en ĉiuj nove enkondukotaj vortoj oni devas eviti la sonon «ĥ» kaj uzi anstataŭ ĝi la sonon «k».

La litero «ĥ» estas necesa nur en tre malmultaj vortoj, ĉefe por eviti homonimecan kolizion. Ekzemploj de tiu ĉi fonema kontrasto estas: koro/ĥoro, eko/eĥo, kolero/ĥolero. Estas interese observi kiel la Fundamenta vorto «ĥoro» iom post iom perdis terenon al sia tre malnova rivalo «koruso» proponita de Zamenhof jam en 1906! Krom «koruso» li rekomendis ankaŭ «ĉoro», sed ĝi restis mortnaskita vorto. Aliaj vortoj, kiuj bezonas «ĥ» estas «ĥoralo» kaj «ĥolero» por distingiĝi de «koralo» kaj «kolero». «Colero» kaj «holero», ambaŭ proponitaj de Zamenhof, ĝis nun ne sukcesis anstataŭi «ĥolero».

Restas kun «ĥ» en Esperanto ankaŭ relative malofte uzataj hebreaj vortoj kaj propraj nomoj el la Biblio, helenismoj kaj mitologiaj nomoj, kaj malgranda mikspoto da slavaj, hispanaj kaj aziaj vortoj kaj propraj nomoj. Eble ankaŭ kelkaj el ili arkaikiĝos rezulte de la superregado de la ko-skolo.

Konsultitaj Verkoj

AKTOJ DE LA AKADEMIO, II (1968-1974). 1975. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto - No. 10. Rotterdam, Paris.

GUMA, SALVADOR. 1979. «Pri la landnomoj». *Horizonto*, vol. 4, n-ro 23 (5), p. 103-108.

KAVKA, JOSEF. 1978. «ISAE-aplikado de Esperanto». *Scienca Revuo*, vol. 29, n-ro 2 (130), p. 89-94.

PLENA ILUSTRITA VORTARO. 1970. Paris.

FUNDACION "ESPERANTO"

Internacia Literatura Konkurso

V E R D I K T O

La 1-an de decembro 1980-a kunsidis la membroj de la Patronaro, Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo, S-ro Víctor Ortiz, kaj F-ino Inés Gastón, sekretariino. Ŝi informis pri la pcentoj asignitaj de ĉiu membro de la Juĝkomisiono, respektive D-ro Carlo Minnaja (Salvazano, Ital.), S-ro Salvador Gumà (Reus, Hisp.), S-ro Miguel Gutiérrez (Santander, Hisp.), kaj S-ro Petro Nuez (Barcelona, Hisp.).

La adicio de la poentoj respektivaj rezultigis:

31 poentojn al konkursaĵo «La origino de la morto», al kiu estas aljuĝita la Unua Premio; «Sancho Rebullida», kaj

po 30 poentojn al konkursaĵoj «Nia vilaĝo, popolo kaj popola kanto» kaj «La astronomia horloĝo en Prago», al kiuj estas aljuĝita la

Dua Premio; «Fundación Esperanto».

La Patronaro decidis ke estu du *duaj premioj*, anstataŭ dividi ĝin.

Tuj poste la sekretariino malfermis la identigajn kovertojn, kaj la aŭtoroj premiitaj estas: S-ro Bernard Golden (Veszprém, Hung.) Unua Premio

S-ro Jindrich Tomísek (Přerov, CS), kaj

S-ro Valdemar Vinař (Cheb, CS) Dua Premio

La Patronaro de «Fundación Esperanto» dankas al la Juĝintoj pro ilia kunlaboro kaj al la partoprenintoj pro ilia entuziasma klopodo vivigi Esperanton per siaj verkoj.

Zaragoza (Hispanujo) la 15-an de decembro 1980-a.

Inés Gastón

Sekretariino de «Fundación ESPERANTO»
kaj de la Konkurso

NEKROLOGO

MANUEL DE ELEZCANO (1886-1980)

mortis la 27-an de novembro en Bilbao, Hispanujo, kie ankaŭ li naskiĝis.

Esperantisto ekde 1909, multe laboris favore al nia idealo, li estis la nuntempa doĵeno de la Bilbao-a esperantistaro.

Poeto kun eksterordinara sentemo, igis de siaj pensoj esprimon de profunda amo al la tero, la pejzaĝo... la vivo! Liaj poemoj, estas bela rememoro, kiu plibeligis la vivon ne nur de la poeto, sed ankaŭ tiun de liaj geamikoj, kiuj havis la plezuron legi ilin.

Pacan ripozon al li!

Por lia familio kaj por la Grupo Esperantista de Bilbao, nian sinceran kondolencon.



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

LA FARAONO. B. Prus. Formato 17 × 24 cm. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio. Prezo: 4,80 gld.

Bildrakonto bazita sur la grava verko de B. Prus. La teksto kompilita de Vilmos Benczik el fame konata traduko de Kabe, akompanas klarige la 138 bildojn kiuj dense okupas 32 paĝojn.

Estas kurioze: Rigardante la bildojn kaj legante tiun kaj tiun el iliaj tekstoj, ŝajnas al mi ke post multaj jarcj mi relegas La Faraonon. Kion mi tiam imagis, mi vidas bildigita ekz. sub numeroj 89, 90, 91; senluma vojo al la trezorejo, koridoroj, pordoj, ĉambroj, mistero, timego!

La bildojn desegnitajn de Attila Fazakas mi konsideras klaraj kaj trafaj. La teksto estas tre korekta. La kovrilo prezentas belan bildon koloran de la Faraono sur glazurita, dika papero.

En mia ĝenerala laŭdo estas tamen unu escepto: La aŭtoro ŝanĝis la Kabe-an formon Egipto je Egiptio, kion nenio serioza pravigas; certe ne la klareco nek la internacieco nek la praktikeco. La landnoma problemo plu bolas interne kaj estus bone memori ke antaŭ unu jaro mi indikis eblan vojon al ĝia solvo.

Resume, plaĉaspekta kaj tre havinda libro eldonita de Hungara Esperanto-Asocio.

Salvador Gumà

NI STENOGRAFAS. Laŭ la Germana Unueca Stenografio adaptita al Esperanto de Wilhem kaj Hans Wingen kun

aldonitaj klarigoj kaj tabeloj de R. Eichholz. Eldonis Baileboro, Ontario, Kanado Kol 1 BO. Prezo, ne indikita.

Broŝuro 40-paĝa, klare presita kaj korekte skribita. Kvankam mi havis okazon trarigardi plurajn stenosisistemojn mi estas tute ne kompetenta juĝi la taŭgecon de difinita sistemo. La nun prezentata Unueca Germana Stenografio adaptita al Esperanto certe funkcias tre kontentige, ĉar pro la adapto ne povis perdiĝi la bazaj trajtoj, el kiuj unu, miaopinie, estas tamen konflikta: Kiam en Germanujo oni elektis tiun sistemon, la globkrajonoj ankoraŭ estis inventotaj, pro kio nun la diferenco per pli dikaj strekoj ŝajnas al mi ne farebla per tiu ĝeneraliĝinta skribilo.

Multaj sistemoj ekzistas, eĉ pluraj esperantigitaj. Inter ili, unu de la kataluno Boada, adaptita al nia lingvo fare de fakulo, nia karmemora Delfi Dalmau, estinta Akademiano.

La rapideco trudas simpligon, mallongigon kaj eliziojn, kio estas kontraŭa al lernebleco kaj legebleco. Profesiuloj povas parkerigi profite siglojn kaj signojn por litergrupoj; ne profesiuloj bezonas ne priamputitan skribon pli facile legeblan kaj skribeblan eĉ se ĝi estas malpli rapida.

La interesatoj mem juĝu ĉu la adapto de S-roj Wingen kun la aldonitaj tabeloj de S-ro Eichholz, prezentas avantaĝon super la aliaj sistemoj. La libro konsistas el nur ses lecionoj kun ekzercoj kaj tabeloj de litergrupoj kaj sigloj.

Salvador Gumà

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ - 1981

21-a ALVOKO

Dezirante okazigi plue la glorajn INTERNACIAJN FLORAJN LUDOJN, kiuj tiel sole ne okazadis 20-foje en diversaj urboj de Katalunujo kaj la insulo Majorko, la Kataluna Esperanto-Asocio denove invitas la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn, konkurse konkuri per siaj plej valoraj verkoj en tiu tradicia Beletra Trobadora Festo kiu celebriĝos en la kadro de la 23-a Kataluna Esperantista Renkontiĝo.

Kiel kutime estos aljuĝitaj la jenaj PREMIOJ:

POEZIA BRANĈO

1. — *NATURA FLORO*: al plej bona am-tema poemo. (Maksimume, 100-versa)
2. — *JASMENO*: al plej bona priesperantisma poemo, aŭ al tiu je temo laŭvole elektita de la aŭtoro. (Maksimume, 100-versa)
3. — *VIOLO*: al plej bona humanisma aŭ etika poemo. (Maksimume, 100-versa)

PROZA BRANĈO

PREMIO al plej bona novelo. (Maksimume, 2000-2500-vorta)

TRADUKA BRANĈO

PREMIO al plej bona traduko, jen versa, jen proza, laŭvole elektita el kiu ajn katalunlingva verko de moderna aŭtoro. (La tradukinto nepre devas kunsendi fotokopion de la originala teksto.)

La poeziaĵoj ampleksu, maksimume, 100 versojn; la prozaĵoj, 750 vortojn.

La Verdikta Konsistorio rajtos, se eble, aljuĝi subpremiojn.

La konkursantoj bonvolu priatenti la jenan

REGULARON

1. — La verkojn oni sendu, po 4 ekzempleroj nepre tajpitaj je duobla interspaco, nur ĝis la 10-a de julio 1981-a, laŭ la poŝtstampo, al jenaj nomo kaj adreso de la Sekretario: Gabriel MORA i ARANA, str. Carrió, 5, 4. MANRESA (Barcelona) - Hispanujo.
2. — *Ne rajtas konkursi* tiuj verkoj antaŭe premiitaj, tradukitaj aŭ publikigitaj.
3. — La aŭtoro de ĉiu konkursaĵo nepre devas resti nekonata; sed, krom la titolo, oni devas skribi specifan moton aŭ pseŭdonimon.
La aŭtoroj enmetu slipon kun siaj nomo kaj adreso en apartan fermitan koverton sur kiu ne manku la titolo, moto aŭ pseŭdonimo, kaj la elektita branĉo.
4. — Kvankam oni devas konsideri ke ĉiu aljuĝota Premio estos, esence, nur honora, ĉiu gajninto ricevos, krom Diplomo, valoran esperantan libron aŭ mondonacon, laŭ ebleco.
5. — La Sekretario antaŭsciigos al la ĵus premiitoj la Verdikton por ke ili povu ĉeesti la Feston aŭ elekti siajn anstataŭantojn (precipe, la gajninto de la Natura Floro, kiu simbole oferdonos ĝin al la Reĝino de l' Poetoj, kaj akompanos ŝin ĝis la trono).
6. — La Organiza Komitato rezervos al si la rajton, dum unu jaro kaj duono, publikigi la premiitajn verkojn.

Barcelona, la 15-an de decembro 1980-a

INTERNACIA CENTRO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO (ICNEM)

Sidejo kaj koresponda adreso: S-ro H. V. Rasmussen, cand. oecon. sekretario-kasisto, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio. — Poŝtĉeka konto: Kopenhago 1190601.

Al aliĝintoj de la 6-a Internacia Konferenco de N.E.M. kaj al aliaj adeptoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado

Oktobero 1980

Tre estimata,

Eĉ se vi ne partoprenis en la laboro de la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, vi verŝajne jam scias, ke en Strasburgo estis fondita Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj akceptita ĝia Statuto. La plej urĝa tasko de la Centro estas havigi solidan financon bazon por plua regula kaj senĝena publikigado de «Horizonto» kaj ev. de aliaj periodaĵoj de la partipolitike neŭtrala kaj sendependa esperantismo. En Strasburgo estis ankaŭ elektita provizora Plenuma Komitato (PK) de la Centro. Ĝi konsistas el:

Prezidanto: Prof. D-ro Ivo Lapenna, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio.

Vicprezidantoj: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio. — S-ro Jean Thierry, 5, rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio. — F-ino Marianne Vermaas, 70, Nieuwe Binnenweg, NL-3015 BC Rotterdam, Nederlando.

Sekretario-kasisto: Cand. oecon. H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

La ĉefa devo de la provizora PK estas funkciigi la Centron, tiel ke la unua regula ĉefkunveno de ICNEM povu okazi dum la 7-a Internacia Konferenco de N.E.M. en julio 1981 en Humlebæk.

Ni jam komencis realigadi la komisiitan taskon. Laŭ la dana juro la Centro havas juran personecon, kio, interalie, signifas, ke ĝi povas akcepti donacojn kaj heredajojn; la Centro havas sian poŝtĉekan konton (Kopenhago n-ro 1190601) kaj en ĝi jam troviĝas kelkaj miloj da danaj kronoj.

Nun ni petas vin aliĝi al la Centro kiel ordinara membro en unu el la kategorioj konforme al Art. 5.1 de la Statuto, t.e. *fondinto*, se vi plenumas la kondiĉojn de Art. 5.1.1, aŭ *bonfaranto* (unufoja kontribuo de 2.000 svisaj fr. aŭ 6.800 danaj kronoj laŭ Art. 5.1.2), aŭ *apoganto* (unufoja kontribuo de 1.000 svisaj fr. aŭ 3.400 d.kr. laŭ Art. 5.1.3), aŭ *aktiva membro* (jara kotizo 50 svisaj fr. aŭ 170 d.kr.). Se vi hazarde ankoraŭ ne havas la Statuton, la Sekretario-kasisto volonte tuj sendos ĝin kaj aliĝilon al vi laŭ via peto.

La plenigitan aliĝilon kaj la koncernan kontribuon aŭ kotizon bv. sendi al la adreso de la sekretario-kasisto. Se por vi estas pli oportune, vi povas pagi vian kontribuon aŭ kotizon al la prezidanto aŭ al unu el la vicprezidantoj je la supraj indikitaj adresoj, kaj ili tuj ordigos la aferon kun la sekretario-kasisto.

Atendante vian tre baldaŭan favoran reagon, ni restas kun bondeziroj kaj koraj salutoj, viaj.

Ivo Lapenna,
Prezidanto

H. V. Rasmussen,
Sekretario-kasisto

7-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

12 - 18 julio 1981

Altlernejo Krogerup, Humlebæk, Danlando

Korespondadreso: H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby

OFICIALA INFORMILO N-RO 2

1. *Programo.* Suplemente al la informoj en Oficiala Informilo N-ro 1 pri la konferenca programo — ĉeftemo *La 100-jara datreveno de Esperanto* ni sciigas, ke la Organiza Komitato turnis sin al kelkaj kompetentaj esperantistoj ekster la aktivula rondo en la Neŭtrala Esperanto-Movado invitante ilin prelegi dum la konferenco. Jam alvenis pozitivaj respondoj de la vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, prof. d-ro *Paul Neergaard*, kaj de juĝisto *Sven Ziegler*, Kopenhago.

2. *Aliĝilo* estas enmetita en tiun ĉi numeron. Uzu ĝin antaŭ la jaroŝanĝo por profiti de la malaltaj kotizoj validaj ĝis la fino de la jaro 1980. Vidu la kotizotabelon sur la dorsa paĝo de la aliĝilo.

HORIZONTO

Kultura kaj informa revuo de la Neŭtrala Esperanto-Movado

Fondita en 1976

Dumonata revuo eldonota ekde 1981 de la
Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado

(ICNEM)

Ĉefredaktoro: *Jean Thierry*,
5, rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

Helpredaktoro kaj administranto: *H. V. Rasmussen*,
Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

Ĉian materialon por la revuo bonvolu sendi al la ĉefredaktoro.

Abonoj estas mendataj ĉe la perantoj de *Horizonto* aŭ ĉe la administranto, poŝt-ĉekkonto de ICNEM: Kopenhago 1 19 06 01.

Jara abonpago por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj aŭ egalvaloro. Tiu abonpago ne inkluzivas membrecon en ICNEM. Vidu la cirkuleron represitan en tiu ĉi numero.

La Esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia okazas lunde, ĵaŭde kaj sabate je la horoj 19-a kaj 23-a mezeŭropa tempo.

Je la 19a horo oni elsendas en la bendoj de 75, 48 kaj 31 metroj.

Je la 23a horo oni elsendas krome en la bendoj de 19 kaj 16 metroj por Afriko kaj en la bendo de 13 metroj por Suda Ameriko kaj Okcidenta Afriko.

Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15.